# *Aprobita per prezidenta dekreto la Nacia Programo por Anta?enigo de la Virinoj*




Havano, mar 9 (RHK) Kiel pruvo de la celoj de Kubo por impulsi la genran egalecon,  ?i-lunde la 8-an de marto, la kuba prezidento Miguel Díaz-Canel aprobis  per dekreto  la Nacian Programon por Anta?enigo de la Virinoj, kiu estis publikigita hodia? en la Oficiala Gazeto nro. 14.

Tiu ?i programo evidentigas la elstaran lokon, kiun la kuba Revolucio donas al la virina digno, samkiel al egaleco de iliaj evoluo-oportunoj. La Programo bazi?as sur rigora observo de la kuba ?tato pri interkonsentoj kaj sindevigoj internaciaj, kiuj subtenas la virinajn rajtojn, kaj prikonsideras la minacojn kaj defiojn devenantajn el la faritaj pritaksoj al la Agadplano de Kubo por atenti pri la IV-a konferenco de UN pri virinoj.

Tiu ?i programo, esence resumas la senton kaj volon politikan de la kuba ?tato kaj konsistigas kernon por evoluigi politikojn favore al la virinoj, donas kontinuecon al avanco kaj evoluigo de la genra egaleco en la insulo kaj instituciigas tiun ?i rajton.

?i impulsas agojn celantajn pli da integraleco kaj efikeco en la prevento kaj elimino de diskriminaciaj manifesti?oj kontra? la virinoj, fortigas la mekanismojn kaj kapablojn profesiajn de la funkciuloj kaj publikaj servantoj por aldoni la genrajn temojn en la ellaboro de politikoj, programoj kaj servo-dono.

?i konsistigas registaran programon, kiun kunpartoprenas la Federacio de Kubaj Virinoj, por anta?enigi kaj garantii agojn de observado, pritaksado kaj kontrolo, kaj ebligas profundigi en la respondoj donitaj anta? la rekomendoj de la Komitato por elimini ?iujn formojn de diskriminacio kontra? la virinoj.

Por konkretigi la Nacian Programon por Anta?enigo de la Virinoj, oni konceptis Agadplanon kun decidoj, samkiel la ellaboron de komunika kampanjo por ?in diskonigi kaj propagandi surbaze de ?ia ?enerala celo: "impulsi la avancon de la virinoj kaj la egalecon de rajtoj, ?ancoj kaj eblecoj, konfirmitaj en la Konstitucio de la Respubliko, samkiel profundigi la objektivajn kaj subjektivajn faktorojn, -kiuj, kiel esprimoj de diskriminacio persistas en la kuba socio kaj baras pli bonan rezulton en la ekonomio, socio kaj familio-, kun la celo elimini ilin".

fonto: Granma

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/250051-aprobita-per-prezidenta-dekreto-la-nacia-programo-por-antauenigo-de-la-virinoj

Radio Habana Cuba